4-a Jaro. N-o 164 APERAS  SEMAJNE 24. Novembro 1927

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

Alía Sacco, alía Vanzetti

Ne nur en Usono, povos okazi tia afero, kia estis tiu de Sacco kaj Vanzetti. Flanken de tiu "demokrata" lando, povas sin meti la egale "demokrata" Germanio, kie okazis kaj ankoraŭ okazas afero mirige simila al tiu pri kiu la tutmonda Proletaro sin okupis ĉi-jare. En Germanio nur mankis ĝis nun ĝuste *tutmonda* protesto kaj tiu manko devas nepre malaperi.

Dum la mortigintoj de Libknefit kaj Roza Luksemburg, de Kurt Eisner, de multaj aliaj malpli famaj revoluciuloj, ne nur estas liberaj, sed oficiale subtenataj … Max Hoelz, germana laboristo ne 30-jara, kuŝas en malliberejo, kvankam estas pruvite, same kiel en la afero de Sako kaj Vanzeti, ke li estas tute senkulpa pri la krimo, t. e. la mortigo al iu riĉa bienulo, pro kio oni enkarcerigis lin antaŭ sep jaroj.

Antaŭ unu jaro, la vera mortiginto, Erich Friehe (Eriko Frije), sin liveris kiel la kulpulon; ankaŭ la ĉef-atestanto kontraŭ Hoelz reprenis sian falsan ateston. Spite tio, *Max Hoelz restas ĉiam en karcero.*

Kiel pri Sako kaj Vanzeti en Usono, tiel oni agis ĉi lastan tempon en Germanio pri Max Hoelz. Komitato stariĝis por trakti lian aferon; la germana "Ligo pri homaj rajtoj" ankaŭ atentis ĝin; la "Ruĝa Helpo" finsukcesis elmontri al la publiko, ne nur la senkulpecon de la akuzito, sed ankaŭ lian heroan vivon kaj organiz-genion, spertitan en la revolucio de 1921, kiam li estris la liveradon de nutraĵo al personoj, kiuj aliel estus malsategiĝintaj.

Famuloj diversspecaj, verkistoj, ĵurnalistoj, profesoroj, pacifistoj, sciencistoj (i. a. du el niaj estintaj honorprezidantoj, Toller kaj Einstein) laŭtigis siajn voĉojn por justeco. La lertega ĵurnalisto E. E. Kisch ("la fluganta raportisto") opiniis, ke Max Hoelz indis priverkon kaj eldonis libron, kiu bone el-



Max Hoelz

montras la simplan fortecon, la ĉiutagan kuraĝon kaj la eblecon klarigi pri proleta situacio kaj programo de tiu juna laboristo.

Oni antaŭmetis la nomon de Max Hoelz ankaŭ rilate la amnestion, okaze de l' 80-a naskiĝreventago de Hindenburg. Tamen, senutile! La ministro de la "justeco", Hergt, konsilis al Hindenburg tion rifuzi.

Max Hoelz restas ĉiam en karcero.

Max Hoelz ricevis sian revolucieman edukon de la granda eŭropa milito, al kiu li propravole iris, lasante siajn gepatrojn (ili estis katolikaj) kaj multnombrajn familianojn, kaj sian terkulturan vivmanieron. Reveninte, li trovis grandan senreviĝon, vidante, ke triono el la loĝantaro de sia urbo senlaboriĝis. Estante ĉiam studema, li sin dediĉis serioze al la klasbatalo, kaj *pro tio,* same kiel en la okazo de Sako kaj Vanzeti, oni traktis lin kiel teroriston kaj krimulon, *pro tio nur* oni surde kaj blinde, obtuze kaj hipokrite rifuzas akcepti la ateston, kiu pruvas lian senkulpecon.

Max Hoelz velkas en karcero. La tutmonda Proletaro liberigu lin!

Kompiltradukis el diversaj fontoj *E. K. L.*



Por la 10-jara datreveno de "Oktobra Revolucio"

Militrememoroj de instrulaboristo

La ununan fojon, kiam mi aŭdis la vorton *"soveto"*, mi estis en tendarejo, tute proksime de la militfronto, en regiono de Soissons (Sŭason'). Estis en monato junio — se mia memoro fidelas — de la jaro 1917. Ni ĵus revenis el la regiono "Vojo de Sinjorinoj", kie 30 000 soldatoj estis mortigitaj en iu ĝeneralatako, ordonita de ĉefministro Painlevé (Penlve'), fame konata pacifisto, por savi la falantan famon de ĉefgeneralo Nivelle (Nivel'). 30 000 proletoj buĉitaj, samnombre, kiel post Pariza Komunumo (1871)!

En daŭro de unu semajno, la vorto "soveto" magie disvastiĝis en nia tendaro. Kredeble, forpermesintoj el nia regimento alportis novaĵojn el la postfronto pri la unua rusa revolucio kaj ĝin disfamigis malgraŭ la mensogoj de la figazetaro.

Estis arda ŝtorma atmosfero. Ni estis izolitaj meze de maldensa arbaro kaj

kolonela ordono estis, ke neniu soldato forpermesu kaj eliru el la tendarejo. Kaj sub tendoj diskutadis la soldatoj dum purigado de fuziloj (pafiloj) aŭ kudrado de butonoj pri la nova esperiga situacio, naskita de rusa revolucio, eble mallongigonta la abomenan mondbuĉadon. Iu klarigis, ke en Rusio nun estas komitatoj el laboristoj kaj kamparanoj, rapidege likvidantaj la carisman reĝimon, kaj aŭdante pri "sovetoj" alia K-do el mia tendo, fabriklaboristo el ferfandejoj de Orienta Francio, kutime silentema, subite leviĝis febra: "La suferadon mi ne plu povas elteni, li koleris. Mi ja havas infanon. La pacon mi deziregas. Ĉu vi ne ĝin ankaŭ deziregas? Ni formu nian soveton..."

Oni longe diskutadis sub la tendo. Estis tie la laboristoj de l' fabriko kaj de l' kampo, unuigitaj en sama hunda vivo. Oni kolere vortumis kiel ofte, pri la burĝidoj kaj elturniĝintoj, kiuj trovis agrablan postenon en iu garnizono for de kugloj, diboĉis kaj patriotaĉis por daŭrigo de la milito "ĝis finvenko". Tiun vesperon, en apuda roto najbaranta niajn tendojn, iu soldato vundis sin ĉe piedo — kvazaŭ senintence kaj pro ŝajna malzorgemo: kuglo estis restinta en sia pafilo. Hospitalon. Kia feliĉulo!...

La postan tagon, mi apartiĝis en silentejo de l' arbaro por skribi sur herbo leteron. Malproksime mi certe aŭdis la pafojn de la dikaj kanonoj de 120 kaj 155 milimetroj, sed pro kutimiĝo senatentis. Sed iom post iom, ŝajnis al mi, kvazaŭ la militfronta linio alilokiĝas kaj eĉ proksimiĝas, kaj jen mi aŭdas funkciantajn mitralilojn, senordajn fuzilpafojn kaj ankoraŭ malproksiman tumulton de antaŭeniĝanta popolamaso. Kaj jen "Internacio" subite heliĝas el la konfuza bruego. Ribelo!

Vesperiĝis: mi reiris la tendon. Ĉiu silentis, mense okupata. Kun K-do, ankaŭ instruisto kaj avangarda, mi diskutis iom mallaŭte; konfidence kaj reciproke ni esprimis niajn strangajn impresojn. Poste, kiel kutime, ni parte senvestiĝis malgraŭ la ordono, sed nur dormetis. Meze de la nokto, subite, pafoj (certe aersupren) aŭdiĝas tute proksime kaj homa ondo invadas la tendojn: "Venu kun ni Parizon. Ni formu la sovetojn. For la militon!..." En nokta mallumo, ili malfermis la tendojn, preskaŭ forportante ilin. Jes, malamikoj ne estis ĉe batallinio, ili estis en Parizo mem.

Ni stariĝis, penis retrovi la vestojn kaj tornistron ... sed jam la revolucia ondo estis for, kredeble al alia regimento por agiti. La tutan nokton, de tendoj al tendoj daŭris viglaj paroladoj kaj ribelkrioj. Certe tremtremis la regimenta oficiraro en la komfortaj dormo-ĉambroj de l' apuda kastelo. Amiko kaj mi atenteme staris la tutan nokton kun dudeko da K-doj. Ni decidis atendi ĝis tagiĝo, sed vane provis rilati kun la ribelintoj. En nokto gvidantojn neniu trovis, ankaŭ ne forkurintojn. Nia roto estis penetrita de nur malforta alo (flanko) de la ribelondo. Pli proksima tuta bataliono de nia regimento forkuris, aliĝante la ribelon. Sed, en mateno ili jam revenis, klarigante, ke montriĝis neebla atingi Parizon kaj ke jam haltis parto da ribelantaro.

Du monatojn poste ni eksciis, ke grava ribelo estis okazinta, trafinta ĉirkaŭe 12 regimentojn. Kelkaj rotoj ne volis cedi kaj restis 40 tagojn en vilaĝo, sieĝitaj, sen poŝtaĵoj, sen tabako, sen manĝaĵoj el ekstere. Ili fine cedis kaj la ribelintajn soldatojn oni disigis, kaj dissendis al plej diversaj regimentoj.

Iun tagon, la generalo informis, ke li revizios la tutan brigadon. De sur sia ĉevalo, li kolere aludis pri la ribelo kaj sciigis, ke tri soldatoj de nia regimento ĵus estis pafekzekutitaj post militjuĝo pro "perfido al patrolando" — "Avo de l' unu — li tondris — estis mortigita de Prusoj dum milito de 1870! Ĉiuj tri esprimis bedaŭron kaj petis pardonon! Sed militistara disciplino malkonas pardonon!..." Poste li malsupreniĝis de sia ĉevalo, kroĉis kelkajn ordenojn, kisante la "bravulojn" — kaj resurĉevaliĝinte, li ridante deklaris al la soldataro: "Estu ĝojaj! Pensu pri nenio; soldatoj ne estas forgesataj. Ĉiu el vi ricevos plian litron da vino. Sed vi ne stulte ebriiĝu. Glutu bone, kiel decas, kaj ne imitu la sentaŭgulojn, kiuj ne scias trinki..." Dirante tion, li imitis la korpogeston de vomanta ebriulo. Tiu buĉisto estis 75-jara.

Nur longan tempon poste, ni eksciis la veron pri la revolucio de Kerenski. Monatojn kaj monatojn ni atendis la okazigon de la socialista konferenco en Stokholmo, sopire kaj vane. Dume ekfurioziĝis Oktobra Revolucio, liberiganta orientan pecon de Eŭropo, ekdetruanta per fajro la miasmojn de Milito.

SAT-ano 518.

ROMAIN ROLLAND PRI SOVETIO

Invitite partopreni la dekjaran jubileon de la OKTOBRA REVOLUCIO, R. R. respondis jene:

"Gefratoj el Sovetio,

"Mi dankas al vi pro via invito. Estus por mi granda ĝojo partopreni la festojn pri revolucio, kiu signas la komencon de nova epoko en la historio de l' homaro. Mia malbona sano malebligas, ke mi faru longajn vojaĝojn dum ĉi tiu sezono. Almenaŭ sciu, ke pense mi ĉeestas inter vi! Kaj akceptu jenan mian saluton!

"Mi estis unu el la unuaj en Eŭropo, kiu aklamis la rusan Revolucion, ĉe la unuaj tagoj de ĝiaj malfacilegaj bataloj, kaj kiam la cetero el la mondo rifuzis ĝin oficiale akcepti. Fidele mi al ĝi gardis mian korligon, malgraŭ la profundaj pensaj malkonsentoj, kiujn ofte mi sincere eldiris, ĉu rilate ĝian intelektan doktrinon, ĉu rilate ĝian politikan agadon. Hodiaŭ pli ol iam, je la horo kiam ĉiuj imperialismoj, ĉiuj faŝismoj, ĉiuj malklerigismoj, helpataj, instigataj de la malnoblega, monavida demono, de la internacia negocistaĉaro, penegas senbridigi kontraŭ la Socialista Soveta Respubliko la gazetaron kaj la publikan opinion — jam ili sukcesis influi registarojn, kies malfortaj reprezentantoj estas nur ludiloj en la manoj de la monaj potencoj — en ĉi tiu horo de danĝero, mi volas rediri, je la nomo de miaj verkistaj kaj pensulaj amikoj el okcidento kaj je mia propra nomo, la publikan ateston de niaj fratsentoj.

"Malgraŭ niaj rasaj kaj mediaj malsimilecoj, ni estas kun vi. Per malsamaj vojoj ni iras al la sama celo. Kio ligas nin, tio ne estas politika aŭ socia doktrino. Estas io multe pli granda. Estas ia komuna Dio: La Laboro. Vi kaj ni estas ĝiaj filoj.

"Ni ĝin servas kaj adoras. Ĝi estas la sango de la tero. Ĝi estas la elspiro de niaj pulmoj. Ĝi estas la Spirito de la Vivo. Antaŭ ĝi, en ĝi, ĉiuj estas egaluloj kaj fratoj. Kaj estas pro tio, ke la Socialista Soveta Respubliko, la unua, starigis ĝian regnon sur la tero, ke mi krias: 'Honoron al tiu Respubliko! Ĝi vivu eterne!'

"Fratoj, ni kunkantu, en ĉi tiuj tagoj, la Himnon al la Laboro, sola reĝo de l' mondo. En ĝi kuniĝu la manoj kaj la cerboj — ĉiuj sanaj, fruktodonaj aktivecoj de la korpo kaj de la penso! Ni formu la harmonian abelujon de ĉiuj laboristoj! For el niaj vicoj la vespegoj! Kaj la Universala Respubliko el la homaj abeloj plenigu la ĉielon per la muziko de siaj flugiloj kaj la parfumo de sia ora mielo!

ROMAIN ROLLAND

(Tradukita el la franca).

Ĉu jam troviĝas en via esperanta libraro la unika verko, kiu ebligas komprenon de la homaj problemoj kaj historio, la *unua proleta atlaso?* Se ne, havigu al vi ĉi belan instruan verkon.

MALGRANDA TERBIBLIO

originale verkita en esperanto de Prof. D-ro FERD. SZERENYI.

ENHAVO: 11 grandaj landkartoj kaj multaj skemoj
kun klariga kunteksto sur bonega papero.
Form.: 26×36 cm. Prezo: **1,80** g. m.

Havebla ĉe la Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig-O-27 (Germanio)

TAGO EL MIA VIVO

Mia vivo jam de du jaroj estas proksimume jena: Mi leviĝas je la sesa horo kaj min pretigas, tiam skribas kelkan tradukaĵon el la "Fundamenta Krestomatio", legas "S-ulon" ktp.

Je la sepa mi devas foriri al la laborejo, kiu estas elektrocentro de fervoja kompanio; en ĉi tiu kompanio la elektra servo estas dividita en fakoj kaj ĉi tiu, en kiu mi laboras estas fako de aŭtomataj semaforoj per kiuj maŝinistoj sin gvidas por kondukado de vagonaroj.

Do mi ekkomencas labori ĉiutage je la oka ĝis la dekdua; vintre mi tagmanĝas kaj ripozas de la dekdua ĝis la dektria, kaj de la dekdua ĝis la dekkvara somere. Post tiuj ĉi horoj mi daŭrigas laboron ĝis la deksepa aŭ dekoka.

Tial mi deĵoras ok horojn ĉiutage. La laboro, kiun mi faras konsistas en muntado de aer- subter-elektraj linioj kaj semaforoj kaj en la konservado de tiuj jam muntitaj.



La salajro ne estas alta nek tre malalta kaj oni estas pagata ĉiumonate. Plie kiam mi deĵoras dimanĉe, mi ricevas duoblan salajron. Tio okazas dufoje ĉiumonate.

Mi estas dudektrijara, ne havas gepatrojn nek gefratojn. Mi loĝas jam de longe kun geedzoj, fratino de la edzino kaj infanino; tiuj virinoj prizorgas mian vestaĵon. Mi min nutras ĉiam en gastejo.

M. Balaguer (8358), Barcelona.

EĤOJ EL LONDONO

Infanoj de la karbministaro brita malsatas kiel kutime. Pligrandiĝas la elspezoj por militŝipoj, gasveneno, aeroplanoj kaj aliaj mortigiloj. Sed nek tiuj ĉi nek la domaĉoj ktp. okazigas la nunan furiozan diskuton inter la episkopoj kaj la kristanoj. Unu episkopo publike predikis aprobe pri la evoluo de la homo el la aliaj bestoj kaj ankaŭ rifuzis kredi, ke la vino kaj pano en la Eŭkaristio fakte fariĝas la sango kaj karno de Jesuo Kristo. Pro tio en la 20-a jarcento la inko fluas de ĵurnalistaj plumoj; pleniĝas la ĵurnaloj; skuiĝas la longaj barboj.

* * *

Ĉe novembro la 11-an okazis "Solena Tago de Rememoro". Parade la reĝo kaj la ĉefministroj publike funebras. Ekspluatiĝas la afero en prediko por patriotismo. La blindaj laboristoj memoras, sed ne komprenas la kaŭzon de milito. Pligrandiĝas samtempe la elspezo armila en preparo por nova katastrofo!

* * *

En la ĵus okazintaj distriktaj elektoj la Labora Partio akiris 128 venkojn. Jam timigite S-ro Baldwin decidis doni la voĉdonrajton al la virinoj, kiuj atingis la 21-an jaron. Li esperas profiti el tiu donaco al la nepolitike edukita virino kaj per sukceso en la venonta ĝenerala parlamenta baloto plifortigi la Duan Ĉambron (Domo de Nobeloj), kiu penos rabi de la Laboristaro la espereblan venkon politikan. Sed eble la virino 21-jara memoras, ke tiu sama politikestro nun proponas malaltigi la subvencion al senlabora 18-jara fraŭlino de 16 ŝ. ĝis 8 ŝ. kaj tiel devigis ŝin vendi sian korpon surstrate, se ŝi ne havas alian enspezrimedon. *488.*

EL PORTUGALIO

La ekonomia situacio. La ekonomia krizo en Portugalio iĝas ĉiam pli akra. La plikostiĝo de la vivbezonaĵoj iĝas pli kaj pli nesuferebla kaj la senlaboreco pli kaj pli ampleksiĝas. La salajroj estas tute ne sufiĉaj. Grandnombre laboristoj elmigras, ĉefe al Brazilio, kie ofte atendas ilin ankoraŭ pli granda mizero.

La militista registaro provis havigi al si eksterlandan prunton por kontraŭi la krizon, sed la kontraŭpropagando de l' elmigrintaj respublikaj politikuloj sukcesis ĝis nun malsukcesigi la entreprenon. Ŝajnas, ke nur Hispanio estis preta prunti monon, sed sub tiaj humiligaj kondiĉoj por la "honoro de la lando", ke la diktatoroj ne kuraĝis akcepti ĝin. Plialtigo de l' impostoj kaj limdepagoj estas intencata, tamen la industriuloj kaj import-firmoj deklaris ĉi plialtigon ne tolerebla, sed male postulis necesan financan helpon.

Atako kontraŭ la okhora labortago. — Sub la preteksto de ŝparemo, la registaro decidis ne plu pagi la horojn de l' ŝtataj kaj privataj oficistoj. Tio estas ignoro de l' okhora labortago kaj despli hontinda, ĉar la portugalia registaro estas reprezentata ĉe l' Internacia Laboroficejo en Ĝenevo kaj aprobis la "Washington-an Interkonsenton" pri la labortempo. Ĝi tie estas trafa pruvo, ke la registaroj havas nenian intereson pri la realigo de l' okhora labortago kaj, ke la laboristoj ne rajtas fidi al la aprobo de l' Washingtona Interkonsento. La ŝtatajn laboristojn la registaro ĝis nun ne minacis per ĉi aranĝo, ĉar ĝi timas grandegajn protestojn.

La politika situacio. — La politiko de l' respubliko travivis en lasta tempo kelkajn ŝanĝojn. En ĉefartikolo de l' subtenata de la registaro gazeto "Imparcial", la respublikaj politikuloj, kiuj parte troviĝas en Francio, estis akuzataj pri konspiro kontraŭ la diktatoreco kaj pri preparo de revolucio en Portugalio. Pro tio la enlandaj respublikanoj estis arestataj kaj parte enkarcerigataj ĉar ili rifuzis subskribi deklaron pri deteno de pluaj konspiroj. Kiam pli poste la registaro retenis la subvencion por la "Imparcial" kaj la redaktoro turnis sin en necenzurita artikolo kontraŭ la registaro, li mem estis arestata!

La timo pro revolucio dume instigis la registaron fari ŝanĝon en la ministraro. Militministro Passos e Sousa fariĝis vicprezidanto de l' registaro kaj ĉefministro, dum generalo Carmona nur estas ŝtatestro. Passos e Sousa reprezentas en la registaro la moderan flankon de l' respublika frakcio kaj opozas kontraŭ la financministro, generalo Sinol. La elekton de Passos e Sousa oni juĝas provizora eksigo de l' monarkia danĝero; tamen la Proletaro per tio tute ne estas subpremata pli malmulte.

Al la monarkistoj ĉi ŝanĝo de l' ministraro ne plaĉis kaj ili faris al generalo Carmona revolver-atencon, kiu tamen malsukcesis. La atencintoj estis kaptataj kaj atendas en la malliberejo sian kondamnon.

Estis la militministro Passos e Sousa, kiu starigis specialan ŝtatoficon kontraŭ la III-a Internacio. Per ĉi ofico nia ĵurnalo "A Batalha" estis subpremata kaj multaj el niaj K-doj estis kondamnataj al enkarceriĝo.

Klasjusteco. — Antaŭ mallonga tempo staris la laboristoj, kiuj estis partoprenintaj la revoluciajn ribelojn de februaro, antaŭ la militistaj tribunaloj. Ĉar nur relative malgrandaj punoj estis aljuĝataj, oni rajtas konkludi, ke la registaro juĝas sin ne tro forta; aliel ĝi ja agus pli severe.

Senindulge la registaro pritraktis nian K-don José Agostinho las Noves. Pro pretekstaj revoluciaj intrigoj, li estis ĵetata de la militista tribunalo de Leiria en karceraĉon sen fenestro nek lumo. Vizitantojn li ne rajtas akcepti.

La laborista movado. — Ĉiuj ĉi cirkonstancoj reagas sur la Laboristaron tiel, ke nuntempe iu senmoveco regas en la revolucia laborist-movado. Tamen la CGT., spite la registara malpermeso, daŭrigas la interrilatojn kun ĉiuj lokaj sindikatoj kaj instigas la organizojn daŭrigi siajn laborojn.

Laŭ la Esp. Informservo de A. I. T.

"La homoj faras sian propran historion, sed ili ĝin faras ne arbitre, — ili estas devigataj agadi ne en la cirkonstancoj, de ili mem elektitaj, sed en tiuj, de ilia plaĉo sendependaj, ilin senpere ĉirkaŭantaj kaj herede ricevitaj." *(Marks)*

MIA BUĜETO

Ĉi tiu temo plej intime tuŝas la ekzistadon de laborista familio. Ĉar la distribuo de l' enspezoj, la prizorgo de l' bezonoj por la familio, ŝarĝas la laborist-edzinojn, kiuj devas per ĉiuj artifikoj subteni la familian ekzistadon, esti neerarema, sagaca kalkulmaŝino, atente taksadi la elspezon de ĉiu monero. Miaopinie ĉi artikoloj precipe rilatas al la SAT-aninoj kaj SAT-an-edzinoj. Dume en la artikolserio "Tago el mia vivo" la laborgajnantaj Gek-doj rakontis al ni laŭ kiaj kondiĉoj kaj ekspluatiĝo povas persalajri sumaĉojn, ni virinoj, laboristedzinoj rakontu, kiel el tiu mizera salajro, gajnata de niaj edzoj, ni povas prizorgi la familion. Ĉi tiuj artikoletoj evidentigu, kiel premas niajn animojn, kiel muelas niajn fortojn la problemoj, kiujn al ni trudas la malhumana, mizeriga kapitalista sociordo.

Estus interese scii, ĉu mem la edzino ankaŭ devas persalajri, ekster la familia prizorgado, kaj pro tio esti duoble ŝarĝata? Kaj kiel mastrumas edzino de senlaborulo?

Tial mia alvoko atingu niajn K-dinojn, laboristedzinojn, SAT-aninojn, aŭ SAT-an-edzinojn, eĉ tiujn ankaŭ, kiuj ne jam konas bone esperanton. La K-doj helpu al siaj edzinoj nesciantaj la lingvon, tradukante iliajn artikolojn.

Jen mi prezentas, kiel mi povas prizorgi la bezonon de nia malgranda familio. Mi ne intencas doni ĝis dekono da kopeko precizan statistikon pri la en- kaj elspezoj, mi nur volas konigi, kian vivnivelon ni havas rilate nutradon, vestadon, distradon, kulturbezonojn ktp. Ĉar mia edzo havas monatan salajron, kiu ĝenerale ne tro ŝanĝiĝas, mi havas preskaŭ la samajn en- kaj elspezojn ĉiumonate, kiuj nur 2—3 rublojn varias.

Nia familio konsistas el 2 personoj. Mi kaj la edzo. Ni estas ankoraŭ junaj, bonhumoraj kaj diligentaj. Kiel bonkvalifikita seruristo mia edzo gajnas per 8 hora labortago 110 rublojn monate. Krom lia salajro ni havas nenian enspezon kaj ĝin mi jene dividas:

	rubl.
partiaj, sindikataj, asociaj kotizoj .	5,50
ŝtata imposto	1,04
loĝejo	2,55
vaporhejtado (de X-a—IV-a monatoj	1,15
elektra lumo	1,50
ligno kaj torfo	6,—
gazetoj	2,20
poŝtelspezoj	1,60
purigistino	4,—
30 litroj da lakto	9,—
120 ovoj	6,—
12 kg. da viando	9,60
3 kg. da grasaĵo (butera)	6,30
8 kg. da faruno	2,16
25 kg. da legomoj (diversaj)	5,—
11 kg. da pano	2,40
3 kg. da sukero	2,—
kafo, teo, fruktoj, ktp.	12.—
ŝparitaj por vestaĵoj, libroj, vojaĝoj, distriĝo kaj rezervo	30,—
	110,—

La diverseco aŭ kvanto de la nutraĵoj varias laŭ sezono, sed por la mastrumado mi ne rajtas pli ol 80.— r. elspezi. Se vi komparos ĉi ciferojn kun la vivnivelo de via familio, vi povas bone konkludi, kiomgrade sufiĉas aŭ malsufiĉas niaj vivrimedoj rilate al la viaj. Krome estas konstatebla, ke ni relative vivas sufiĉe bone, kion ni povas danki unue, al tiu fakto, ke kompare la enspezon nia familio estas malgranda, due, ĉar malgraŭ tiu favora situacio tamen ni vivas racie kaj ni elspezas monon nek por alkoholaĵo, nek por tabako aŭ por ia sencela, malbezona luksaĵo.

V. M. (1311).



EL AŬSTRIO

La eksiĝoj el la eklezio

Depost kiam la policistaro Viena mortigis kaj vundis multajn gelaboristojn kaj la ministro Seipel elparolis sian dankon al la murdistoj, ne havante kompaton por la viktimoj, multaj gelaboristoj eksiĝis el la eklezio de Seipel. Kredemaj kristanoj diris: "Oni ne povas esti en eklezio, en kiu Seipel estas prelato." Post la pafado de Schöber, la pastroj kredis, ke tiu ĉi movado ne daŭros longe. Sed male, la eksiĝoj daŭras.

Depost la *20*-a ĝis 31-a de aŭgusto 1927, *2722* gelaboristoj anoncis sian eksiĝon. El ĉi tiuj *2722* personoj, aliĝis *27* al la antikva katolika eklezio kaj 28 al la evangelia. Depost la 6-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto, eliĝis el la katolika eklezio 9769 geviroj. De la 2-a de septembro ĝis la 30-a ree eksiĝis 1496 geviroj kun *227* infanoj en Vieno el la katolika eklezio.

En septembro de la pasinta jaro, eksiĝis en Vieno 1494 personoj kaj en la ĉi-jara septembro, 7199 sen la infanoj.

Depost la 15-a de julio ĝis la 30-a de septembro, 6431 geviroj Vienaj respondis la fiagadon de Seipel kaj Schöber dum la Viena ribelo per la eklezia eksiĝo — kaj la gepatroj forprenis centojn da infanoj el la influo de la Seipel-eklezio.

La disdono de ordenoj al la murdistoj flanke de la Aŭstria registaro ankoraŭ nutras ĉi-movadon, kaj la ateisma movado en Aŭstrio faras grandan agitadon por la eksiĝoj.

(INO.)

"... Kiam venas revolucio, la afero ne okazas tiel, kiel kun la morto de individuo, kiam ties kadavron oni elportas foren. Kiam pereas malnova socio, neeblas fermi en ĉerko kaj entombigi ĝian kadavron. Ĝi malkomponiĝas interne de nia medio, ĝi putras kaj infektas nin mem."

(Lenin.)

PRI RACIIGADO

(Fino)

III.

Sed paralele kun la kapitalismo kaj kiel ĝi, la laborista movado devas sin turni al la scienco. La principo de raciigo povas aplikiĝi tiel bone en la regiono de ĝiaj propraj institucioj, same kiel por kompletigi siajn sindikatajn metodojn de rajtopostulado kaj agado.

Jen kial en la entreprenoj, kie la aplikoj de la raciigo fariĝas per kreskigo de la individua produktokvanto, kiu finiĝas ĝenerale per trolaciĝo, ofte per senlaboreco, kaj en multaj okazoj per malaltigo de la salajroj, montriĝas nepre necese, modifi konsekvence niajn sindikatajn metodojn de rajtopostulado kaj agado.

Ĉie, kie la procedoj de laborenspezo, samkiel la ĝeneralaj kondiĉoj faritaj al la laboristo, estas fiksitaj per la novaj procedoj uzitaj por la produktado, la sindikataj metodoj de rajtopostulado kaj de agado devas adaptiĝi kaj retrovi la mastran kontraŭulon sur la nova plano, kie estas translokita la laborista batalo.

Nur tiam la sindikata rajtopostulado ne plu povas esprimiĝi sammaniere. Ĝi reaperas sub aliaj formoj, en la plendpostuloj celantaj la fiksigon de la tempo kaj kosto asignitaj por la laboro, kaj kiu devas garantii la minimuman salajron, limigante la rapidecon de la moviĝantaj stabloj, eĉ de la maŝinoj, samkiel en la kontrolado de la procedoj de kronometrado (tempomezurado) kaj de pruvado. Unuvorte, en la malpliigo de la fortodaŭro liverita de la laboristo, por tiamaniere kompensi la lacecon.

Tiujn rajtopostulojn, komence fiksitajn de la sindikatanoj en la kadro de la entrepreno kaj laŭ la apartaj kondiĉoj de tiu ĉi, la sindikato devas klopodi unuigi, kunordigi, en la lokan aŭ regionan kadron, kie etendiĝas ĝia aktiveco, postulante la unuformigon de la plej bonaj metodoj de organizado kaj de salajrado de la laboro, en ĉiuj entreprenoj farantaj samajn laborojn.

Sed por kontraŭbatali tiel la trouzojn ĉe la aplikado de tiuj novaj metodoj, la sindikato devas bone koni tiujn ĉi, alproprigi al si ilian praktikon kaj studi ilian teknikon, por kontraŭmeti al tiuj trouzoj seriozajn kaj realigeblajn rajtopostulojn.

La farado de kolektivaj laborkontraktoj, kiu trudiĝas kiel unua haltejo sur la vojo kondukanta al laborista kontrolo, kaj, sekve, al la demokratio en la fabriko, povas esti ricevita per la sindikata agado nur post la realigo de tiuj necesegaj kondiĉoj . . .

Tiun rezolucion alprenis la delegitoj de la Unuiĝo de meĥanikistoj el la Pariza regiono.

Elfrancigis *I. H. K.*

MINIATURBILDO EL HUNGARIO

La ĉi suba historieto okazis antaŭ nelonge en Budapeŝto. Ni estis triope, junuloj-esperantistoj. Ni staris ĉe la kruciĝo de du stratoj kaj iu K-do el ni ĝuste laŭtlegis la ĵus projektitan ekspozician peresperantan informilon. La afero okazis vespere ĉirkaŭ la duono de la 10-a h. Nia K-do apenaŭ povis legi kelkajn liniojn, kiam subite ekaperis policano kaj direktis siajn paŝojn ĝuste al ni. Kun rigardoplena mieno li alpaŝis nin kaj demandis:

— Kia pritraktado daŭras ĉi tie?

— Nenio, respondis ni, nur ian esperantan skribaĵon ni laŭtlegas, kiu rilatas al la esperanto-ekspozicio aranĝota.

— Ĉu vere? li demandis.

— Jes, vere, kaj por forigi lian dubemon, mi donis la skribaĵon en lian manon por ĝin legi.

Sed verŝajne li ne volis malkaŝi al ni sian malscion rilate la temon (aŭ la legon), li simple redonis ĝin nelegite kun jenaj vortoj:

— Do, tiam vi *cerbumadas* ne pri ia *malbono,* ĉu ne?

— Tute ne, ni respondis kvazaŭ ĥore.

— Kaj, ĉu vi ne estos farintaj bruon?

— Ja ni ne trinkas alkoholon, kaj sekve ni ne estas alkoholuloj.

— Nu bone, nur ankoraŭ nelonge vi estu ĉi tie, li diris kaj post tio li foriris.

Jen okazintaĵeto, sufiĉe karakterizanta la ĉi tieajn statojn.

Necesas ankoraŭ rimarkigi, ke ĝuste je tiu vespero la ĉi tiea socialdemokrata partio anoncis grandan popolan kunvenon kontraŭ la milito, kiun la polico malpermesis, ĉar tiutempe multmiloj da laboristoj strikis, kaj la polico timis pro iaj eventualaj malagrablaĵoj.

Rakontskribis Iu.

Konsilejoj pri edzeco kaj seksa vivo

Ekzistas jam en germanaj urboj kelkaj tiaj informejoj. Ili estas fonditaj aŭ de privataj unuiĝoj aŭ de urbaj administracioj. Iliaj taskoj estas: unuflanke doni konsilojn al edziĝontaj aŭ edziniĝontaj personoj, precipe pri tio, ĉu ilia sanostato permesas la edzecon aŭ ne. La deĵoranta kuracisto esploras, ĉu la antaŭuloj de la vizitantoj estis sanaj aŭ suferis je ia malsano, kiu eble denove povus ekkapti la posteulojn kaj idojn. Kelkfoje oni konsilas senzorge edziĝi, aliafoje oni malkonsilas aŭ proponas prokrasti, por ke la koncerna malsano antaŭe estu kuracata. Aliflanke la konsilejgvidanto donas informon pri naskiĝevitaj rimedoj, pri kiuj la plejmulto de la vizitantoj petas. Ne estas mirinde, ĉar la kapitalista leĝo postulas, ke naskiĝu infanoj, kaj ĉiam infanoj, tute egale, ĉu la patrinoj estas ege malsanaj aŭ pro jam multaj infanoj ne povas nutri pluajn idojn. (Mi menciu, ke la vizito de tiuj konsilejoj estas tute libervola, ne leĝe deviga, kio estas grava rilate la unuan taskon.)

El la spertoj kolektitaj de S-ino Dr. Hertha Riese, gvidantino de tia konsilejo en Frankfurt, fondita de la asocio por patrina protekto, mi citu jenon:

La konsiloj ĉefe temas pri evitigo de naskiĝoj. 95% de la vizitintaj familioj estis senlaboraj (patro kaj patrino). 60 ĝis 70% loĝis en tute nesufiĉaj loĝejoj. 10% de la virinoj estis tre malsanaj, pleje je la pulmoj. La infanoj el tiuj familioj ofte mortis en la du unuaj vivjaroj (18—20%). Ĉiu kvina kaj plua infano kutime baldaŭ mortas. Efektive sanaj estas nur 39% el la infanoj de la konsilpetantoj. La koncernaj familioj havas meze 3—5 infanojn, certe tro granda nombro por proletaj enspezoj kaj salajroj. Tre malmultaj havas nur 2 infanojn. Venis virinoj, kiuj jam 16-foje gravediĝis kaj ĝis 13 vivantajn infanojn havas. Ĉiuj petintoj tute ne emis "ĝui sen danĝero", kiel la burĝoj (laŭ propraj spertoj) supozas. Nur la plej granda mizero devigas ilin eviti la naskon de novaj "malsatuletoj". Oni konstatis, ke malriĉaj, ofte senlaboraj familioj malgraŭ korpa sano havas nur 27—28% sanajn, sed 46% malsanajn, kaj 24 ĝis 25% en infanaĝo mortintajn infanojn. Al la kompatindaj etuloj ja mankas lumo, suno, valora nutraĵo, kaj sufiĉa vestaĵo. Infanoj de ftizaj gepatroj ne havas ian vivŝancon. Infanoj de drinkuloj grandnombre estas malsanaj (60%), krom tio 21% mortis en infanaĝo.

Ĉiuj cititaj faktoj devenas el la nomita konsilejo. Kiom da homoj mortas en matura aĝo pro la infana mizero kaj pri kiuj neniu statistiko estas ebla!

Estas evidente, ke tiaj konsiloj multe helpas al laboristaj familioj, des pli ke la leĝoj tute ne permesas la naskiĝeviton post gravediĝo.

Fine mi menciu, ke ĵus alvenis la fidinda sciigo, ke germana profesoro Haberlandt el Innsbruck sukcesis eltrovi pilolojn, kiuj povas malebligi la gravediĝon por laŭvole longa tempo. Ĉi rimedo estas tute certa kaj nedanĝera por la virinoj, kiuj ĝin uzas. Eklezio kaj juristoj jam komencis la batalon kontraŭ ĉi rimedo, nomante ĝin kontraŭleĝa. Kompreneble ili tute malpravas. Espereble ĉi rimedo pruvos sian famon je la beno de la Proletaro!

Chemnitzano (3018).

Kion mi vidis en Turkio

Homoj — Aŭtomatoj

Eble aliaj K-doj raportos ankaŭ "Kion ili vidis" por estontaj generacioj pri nuna epoko.

Unu el miaj aliklasaj konatoj diras, ke "la sola instigilo por turko estas ordono; turko nenion faros ĝis kiam li ne estos minacata aŭ pelata al ago de estraro". Al mi prezentiĝis okazo vidi la aplikon de estreco.

Antaŭ ne longe mi troviĝis apud la maristejo en Konstantinopolo. Mi rigardas super la ĉirkaŭantan muron, por vidi la maristojn, farantaj siajn ekzercojn. Sur la korto estas kelke da taĉmentoj. Sub mia nazo staras taĉmento estrata de suboficiro. Mi ĝin observas. Alvenas deĵoranta oficiro, li observas. Nun la suboficiro devas montri kiel li estras la taĉmenton. Li trovis, post zorga ekzameno, ke la ĉapo de certa maristo ne sidas tute rekte laŭ regulo, li alpaŝas al la maristo, ŝmace frapas lian vizaĝon kaj klarigas en kolera tono, ke la ĉapo ne estas ĝuste metita. La maristo metas la ĉapon laŭ la ordonita pozicio, tenante la langon firme inter la dentoj. Nun alproksimiĝas la oficiro, junulo ĉirkaŭ 26-jara, bone nutrita kun fortike dika korpo. Li inspektas la taĉmenton kaj trovas, ke unu maristo ne staras en preciza linio kun la aliaj, rigardas lin sovaĝe kaj, dirante ion en grumblanta tono, forte ektiras orelon de la maristo. La lasta senvorte ordiĝas.

Poste la taĉmento devis fari diversajn ekzercojn: paŝado, marŝado, rampado ktp. Ordono kuri, krio "returniĝu" aŭdiĝis; dum la kurado iu maristo, ŝajne, ne tute laŭtakte kuris kun la aliaj, ĉar la pugno de la oficiro trafis la dorson de la maristo. Nun la maristoj devis kuŝiĝi sur la teron, la ventro suben, kaj levi sin sur la kubutoj, tenante la lobojn orelajn per la dikaj kaj montraj fingroj. Inter la brakoj transe kuŝis ilia pafilo kaj nun ili devas antaŭenrampi uzante nur la kubutojn kaj piedpintojn. Tasko malfacila. Iu maristo ne iras tiel rapide kiel la aliaj, la oficiro alpaŝas kaj instigas lin per piedfrapoj. Jen alia maristo subite ricevas fortan frapon sur la frunto per la dorso de la mano. Ĉiufoje la agoj de la oficiro estas akompanataj de torento da fivortoj, boje dirataj. Poste li stariĝas je iom da distanco for kun transe malfermitaj kruroj, falditaj brakoj, kvazaŭ por diri: mi estas la estro de vi ĉiuj. En tiu al li oportuna pozicio li observas la taĉmenton ĝis la fino de la ekzercado. La oficiro haltigas ĉiun mariston, kiu preterpasas lin, kaj faras al li kun rikana mieno iun rimarkon. Post la dorso de ĉiu alparolita maristo la oficiro kontente ridetas al si, lia vizaĝo montras despotan kontenton, ke li povas laŭplaĉe ekzerci sur homoj sian pasion de kolero. Maristoj devas toleri ĉion en sklava silento. Mia sango bolis, vidinte tion, kaj mi decidis esti la voĉa atestanto antaŭ la mondo pri tiuj sklavoj en Turkio.

E. E. Y.

TRA ESPERANTIO

EL LA REDAKTEJO

Ĉi tiu n-ro estas grandparte de la subskribinto prilaborita kun la helpo de K-ino E. K. Limouzin. La pagita redaktoro ja senaverte forlasis sian oficon la 4-an de novembro. Pri tio ni opinias necese doni kelke da klarigoj al la SAT-anaro.

Ni faris kun I. H. Krestanoff sesmonatan kontrakton (renovigeblan) laŭ kiu li devis dediĉi sian tutan tempon al nia afero. Konante lian kapablecon per liaj verkoj, ni povis supozi, ke "S-ulo" fariĝos en liaj manoj unu el la plej bone redaktataj esperantaj gazetoj. Tiel bedaŭrinde ne okazis. Ĉiuj spertaj personoj jā povis rimarki multege da eraroj, ĉu stilaj, ĉu gramatikaj, ĉu pure teknikaj, eĉ frazojn tute ne kompreneblajn. Fariĝis do evidente, ke la redaktoro tre supraĵe prilaboris la manuskriptojn antaŭ ol sendi ilin al la presejo. Kial tio povis okazi? Simple tial, ke la dungito estis okupata per aliaj personaj laboroj kaj traktis la SAT-laboron kiel akcesoraĵon. Ni ja eksciis, ke I. H. K. estas pagita korespondanto de kelkaj bulgaraj gazetoj, ke li plie venis Francion ĉefe por prepari sian doktoriĝon. En tiaj kondiĉoj oni bone komprenas, kial nia gazeto ne akiris la lingvan kaj stilan perfektecon, kiun ni rajtis postuli.

Kaj okazis eĉ io pli grava pri kiu ni unue deziris silenti. Aperis en la n-ro 156 de "S-ulo" artikolo, kiu laŭdas mortintan verkiston, bone konatan en Bulgario kiel *faŝiston.* La Legantaro juĝu mem laŭ la ĉi-suba letero, kiun ni ricevis el Bulgario:

"Karnobat, 5. X. 1927.

Estimata K-do

Mi legis en n-o 156 de "S-ulo" la artikolon de I. H. Krestanov pri "Stojan Mihajlovski". Mirinda afero! Demandu kiun ajn en Bulgario, kaj li diros al vi, ke Mihajlovski estas unu kontraŭulo granda de la batalanta laboristaro. Vere estas, ke li estas bona verkisto-satiristo, kiu verkis tre valorajn satirojn, sed li en lasta tempo estiĝis tia homo, kiu ne povas esti ne malamata de ĉiu laboristo. Li estiĝis . . . faŝisto! Ĉiu lin konas bone kiel granda faŝisto (en Bulgario — "kubratisto"). Li estas "filozofo" de la bulgara faŝismo, kiu skribis longajn artikolojn en la gazeto "Kubrat" kontraŭ la laboristoj, kontraŭ la progreso, kontraŭ la liberiĝo de la Proletaro . . . Ni, kelke da laboristoj en la urbo Karnobat, petas, ke vi skribu pri la malvero de la artikolo de I. H. K. Se vi volus certiĝi, mi sendos al vi la ĵurnalon "Kubrat", en kiu estas skribita io de St. M-ski. Ni volas nepre, ke vi sciigu la veron pri li! Ni atendas.

Por la grupo,
Teodor D. Popov[1])."

Kiel oni vidas, ne mankis al ni motivoj por riproĉegi al la pagita redaktoro. Sed ni estis ligitaj per sesmonata kontrakto kaj sekve volis pacienci ĝis la fino. Laŭ tiu kontrakto devis esti pagata al I. H. K. la duono de liaj vojaĝelspezoj. Ni konfesu, ke nia trofidema Sekretario pagis la tutan sumon tuj ĉe la unua monato de la enoficiĝo. Kaj jen la s-ro post tri monatoj nuligis la kontrakton, forlasante la oficon. Ni ja povus nin turni al tribunalo por postuli de la kontraktrompanto monkompenson. Tio naŭzas al ni. Ni decidis nur konigi la farojn kaj *malfarojn* de la forkurinto, lasante al la tuta SAT-anaro la zorgon fari mem la proceson. Estas ja tre ĉagrenige kaj indignige, ke la SAT-kaso estas helpinta al iu sinjoro por fariĝi doktoro de francia Universitato. Ni lernu el tio; pli ol iam ni estu severaj kontraŭ la profitemuloj[1]); ni streĉu la fortojn kaj faru, ke SAT restu ĉiam organizo, kiun vivigas oferemo kaj sindonemo.

Dume ni klopodas por trovi alian redaktoron — redaktoro, kiu estu ne nur sufiĉe klera kaj lingvokapabla, sed ankaŭ preta sin dediĉi tute al nia Afero. Eventualajn proponojn kun pruviloj pri kapableco ni volonte ekzamenos.

E. Lanty

Legita kaj aprobita de la Parizaj EK.-anoj.

[1]) Eble K-doj pensos, ke ni vere tro prokrastis la aperigon de la ĉi supra skribaĵo. Ni devas do klarigi, ke la kulpulo, leginte la proteston de niaj bulgaraj K-doj, aplombe asertis, ke ili eraras; li montris al ni du lab. gazetojn bulgarlingvajn, kiujn ni ne povis legi, dirante, ke en ili ankaŭ oni laŭdis S. Mihajlovski. Antaŭ ol findecidi ni volis esplori la aferon, skribis al K-do Popov kaj ricevis respondon, kiu absolute neniigas la mensogajn asertojn de s-ro I. H. K

[1]) S-ro I. H. K. instruis la francan lingvon en bulgara lernejo antaŭ ol veni Parizon. Li sekve ricevis de la bulgara ŝtato salajron dum sia dumonata libertempo, tial ke li eksigis nur ĉe la fino de la libertempo. Dum kelka tempo li do ricevis duoblan salajron.



Oficiala Komuniko

Kelkaj K-doj jam sciigis al ni sian miron pro tio, ke ĝis nun ne estas publikigita bilanco pri la VI-a Leningrada Kongreso. Eĉ "bonanimaj" personoj aludis pri neeldireblaj kaŭzoj. Dume ni klopodadis por ordigi la aferon, ne atentante pri malicaj suspektoj. Sed hodiaŭ ni ne plu volas prokrasti por konigi al la tuta SAT-anaro la verajn motivojn pri la ĝisnuna nepublikigo de la bilanco.

La ĉi suba letero, kiun ni publikigas kun la konsento de la aŭtoro klare montras la kialon de la prokrasto. Ni profitu la okazon por diri, ke ni, la unuaj, bedaŭras pri tiuj neregulaĵoj; ni ja preferus utiligi nian tempon al pozitiva laboro ol al ordigo de tiaj aferoj.

EK. de SAT.

"Leningrad, la 12. X. 27.

Al la Ekzekutivo de SAT, Paris.

Karaj K-doj!

Responde al via letero de la 6. X., mi komunikas, ke la bilanco de la VI-a ne estas sendita al vi ĝis nun pro jena kaŭzo: la estinta peranto, kaj estinta SAT-ano n-o 5869 Dunajev, A., *kiu okupis la oficon de kasisto dum la kongreso kaj havis plenan materialon financan,* ĝis nun *ne transdonis ĝin al ni, malgraŭ niaj sentinaj postuloj . . . Ni minacis procesi kontraŭ li kaj konsentis ioman prokraston. Sed tamen ĝis nun (jam pasis 2 monatoj) la bilanco ne estas ĉe ni.*

Tre malagrable estas procesi kontraŭ SAT-ano, sed tamen ni ĝin faros, despli, ke simila fihomo ne povas esti nomata SAT-ano. Jen, K-doj, la kaŭzo de tiu bedaŭrindega prokrasto.

Mi esperas, ke tamen, ni devigos Dunajev fordoni la materialon kaj se la lasta montros iajn difektojn, ni senhezite kaj senkompate punos lin."

Sennaciece via, S. Podkaminer (1679).

DISKUTEJO

En "Solidaridad", hispanlingva organo de la Industriaj Laboristoj de la Mondo, I.W.W., la 21. 1. 27 Adolfo García proponis disputi kun iu pri la demando: Ĉu estas revolucia sindikatista organizado per si mem sufiĉa por akiri la liberiĝon al la laborista klaso? García diras: "Laŭ mia kompreno revolucia, sindikatista organizado baziĝas sur la klasbatalo kaj havas por fincelo la forigon de la salajra sistemo kaj la malaperon de la kapitalista klaso. Tiu uzas, por havigi la aspirojn, kiujn oni proponas, la rektan agadon, t. e., la ĝeneralan kaj neĝeneralan strikon, la bojkoton, la unuiĝmarkon kaj aliajn rimedojn, kiujn oni estas ĝeneraliginta sur la kampo laborista revolucia. Mi aludas neniel pri la organizoj, kiuj enlasas kaj uzas la politikan lukton, la klaskunlaboradon kaj la aliajn armilojn uzatajn de la katolikaj sindikatoj, la liberaj aŭ ceteraj "flavaj", aŭ kompaniaj organizoj. Ankaŭ mi kredas, ke la organizo devas esti pure klasa kaj de strukturo industria kaj pli alcentrigita ol estis kaj estas la industriaj federoj de la landoj, en kiuj ĝis nun ekzistadis organizoj pli malpli sindikatistaj. Por ke la temo estu pli diskutebla kaj povu disvolviĝi laŭ formo, kiu ne okupos tro da spaco kaj ne rompiĝos, mi opinias pli bone dividi ĝin en kelkajn punktojn, kiuj, mi kredas, devas montri etapojn je la marŝado de la Proletaro al sia liberiĝo. Tiuj punktoj estas: 1. La estreco de la laboro kaj la malapero de la senlaboreco. 2. La estreco de la produktado kaj malapero de la komercaj krizoj, kun la ebla malaperigo de la internaciaj militoj. 3. La kontrolo de la kvalito de la produktado kaj malaperigo de la produktado de ĉiuj malutilaj objektoj, kun la grada forigo de ĉiuj parazitaj laboroj. 4. La forigo de la salajra sistemo, la subpremo al la kapitalista klaso kaj la ŝtato, per la ensorbado al la vicoj de la laborista klaso, kaj la enplantado de liberaj komunumoj."

Mi tradukis tiun ĉi artikoleton, kredante ke la temo tion meritas, kaj pensante ke eble SAT-anoj volos diskuti ĝin. *(1781)*

★ DIVERSAĴOJ ★

ADRESARO POR KOLEKTIVA KORESPONDADO

Ni, subskribintoj, kompilis por la Jarlibro 1927 la supre nomitan Adresaron. Ni opiniis, ke ĉi tiu Adresaro povus esti tre utila, ke ĝi plifaciligus la peresperantan Internacian Laboristan Korespondadon.

Por plibonigi nian Adresaron ni petis alsendon de novaj adresoj, informoj pri eblaj malĝustaĵoj, konsiloj kaj proponoj. Sed ni ne spertis ĝis nun, ke oni multe interesas sin pri nia Adresaro. Male! NI NE RICEVIS EĈ NUR UNU POŜTKARTON!

Kion ni devas konkludi el ĉi tio? Ke la Adresaro estas tute perfekta, tute kompleta, neplibonigebla? Aŭ ĉi tio: ke oni ne uzis ĝin, ke ĝi ne utilas?

Ni ne scias. Tial ni petas tiujn K-dojn, kiuj uzis la Adresaron, al kiuj ĝi utilis, senprokraste informi nin pri tio. Se la Adresaro ne estas uzata, ni povas uzi la spacon en la Jarlibro pli utile.

Ni do atendas.

G. P. de Bruin, Wagelerdw. str. 28 B, *Enschede* (Nederlando).

D. Snejko, poŝtkesto 33, *Minsk* (Sovetio).

*

HISTORIO DE NIA MOVADO

Por kompilota historia skizo pri la laborista esperanta movado antaŭmilita mi bezonas materialon.

Mi bezonas: 1. priskribojn pri la plej frua laborista esperanta movado en diversaj landoj; 2. notojn pri kaj bildojn de pioniroj de nia movado en antaŭmilita tempo; 3. dokumentojn (malnovajn gazetojn, afiŝojn, fotojn ktp.).

Helpu min, por ke mia skizo iĝu kiel eble plej kompleta!

Skribu al: *G. P. de Bruin,* Wagelerdw. str. 28 B, *Enschede* (Nederlando).

*

PROGRAMO DE SAT

Laŭ la decido de la lasta SAT-kongreso, estas elektita komisiono por preparo de la fin-skizo de programo ĝis la proks. kongreso, konsistanta el K-doj: Revo, Kolĉinski (Kremenĉug), Starr (London), Richter (Kassel), Platiel, Salan, Muravkin (Berlin). 1. La membroj de la komisiono estas petataj alsendi al la sekretario *(pozitivajn)* aldonojn kaj aliigojn al la originala skizo de la programo (vidi "*S-ulo*"-n n-o 26, 1926) kaj al la jam publikigitaj aldonoj aŭ aliigoj en "*S-ulo*" n-o 148, 1927; 2. K-doj Revo, Platiel kaj Salan bonvolu sciigi siajn adresojn al la sekretario. Post kolekto de la aldonoj de ĉiuj membroj, ili estos presataj kaj sendataj al la komisionanoj kaj al la Direkcio por plua kritiko kaj voĉdonado.

La sekretario, Herbert Muravkin (2921), Germanio, Berlin-Charlottenburg IV, Wielandstr. 11, III.

*

LUKTO KONTRAŬ ŜOVINISMA EDUKADO

Rezolucio alprenita de la Internacio de Militbatalintoj dum sia 5-a kongreso en Bruselo (10—12-an de julio 1927).

La 5-a kongreso de l' Internacio de la Militbatalintoj kaj Militviktimoj, aŭdinte la raportojn, kiuj pruvas, ke la edukado de la junularo en burĝa reĝimo estas direktata al tendenco klare naciisma,

1. per aplikado de lernejo-programoj, kiuj sin bazas sur ekzalto (ekscito) de patriotisma sento, ĉefe per morala kaj historia instruado donata laŭ tendenca maniero;

2. per uzado de lernolibroj (pri legado, recitado, kantado, historio, geografio) enhavantaj multe da paĝoj inspiritaj de ŝovinismo, laŭdegantaj la abomenaĵojn faritajn dum mondmilito kaj ekscitantaj malamon inter iuj fremdaj popoloj;

3. per la soldata preparo malkaŝa aŭ maskata en lernejo mem;

4. per la partoprenigo de lernantoj en ceremonioj organizitaj ĉu en lernejo mem, ĉu publike;

5. per grupoj eksterlernejaj, patriotaj, naciistaj, religiaj kaj per ilia enmiksiĝo en la lernejan edukadon;

Protestas kontraŭ tiuj diversformaj venenigoj de junulara menso;

Deklaras, ke ĝi volas kontraŭagi la socio-klasan edukadon donitan de la burĝaro, precipe la naciistan propagandon,

1. disvastigante ĝenerale ĉe la loĝantaro kaj aparte ĉe la Mondmilitaj Batalintoj la ideon de kontraŭmilitismo enhavatan en jenaj vortsignaloj: "Militon kontraŭ milito!" kaj "Pacon al popoloj!"

2. agante kontraŭ la lernejaj programoj kaj libroj inspiritaj de ŝovinismo per kontrolo de la proletariaj gepatroj;

3. luktante kontraŭ ĉia soldata preparo en kaj ekster la lernejo;

4. denuncante la veran karakteron de la junularaj organizaĵoj (skoltaj ligoj) kreitaj aŭ patronitaj de burĝaro;

Decidas kunigi sian penadon kun tiu de la geinstruistaro, ĉefe kun la Internacio de Instru-laboristoj, per intima kaj konstanta kunlaborado sur nacia agadkampo en celo senigi la instruadon je ĉia ŝovinisma ideo.

*

Ankoraŭ pri Privataj aferoj

Ni ricevis jenan leteron, kiun ni publikigas kun la espero, ke ĝi estas la lasta vorto pri tiu afero:

Kara K-do!

En "S-ulo" n-o 158 de 13. 10. 27 aperis protesto de Ĝeneva Lab. Esp.-Grupo kontraŭ "bedaŭrindaj atakoj" direktitaj al s-ro *E. Privat,* gvidanto de la neŭtrala movado. Ĉar en la sama protesto estas refutata mia cito dum la Leningrada Kongreso pri s-ro *Privat,* parolinta en Sud-Slavio pri la "grandanimeco de la Ligo de nacioj" — mi opinias utile interveni por klarigi iom la situacion. Mi ne miras pri la letero de Ĝeneva Laborista Esperanto-Grupo. Por miri necesus, ke mi sciu la nombron de SAT-anoj en tiu grupo, kaj ke mi ne sciu la iniciatinton de tiu protesto, sekvinta unu jaron post mia parolo[1]).

Dum Danzig-a Kongreso min riproĉis s-ro *Privat* pri la sama mia parolo — kaj proponis ke mi publike diskonigu malveron de ĝi. Nu, mi ja persone ne ĉeestis en Sud-Slavio la kunvenon, kie parolis s-ro *Privat,* sed mi legis pri tiu parolo en "S-ulo" n-o 87 de 27. 5. 26 (artikolon de Sudslavia K-do. Tiun artikolon sendube legis ankaŭ s-ro *Privat,* kaj se li ne trovis necesa siatempe refuti komunikon de nia K-do — do la komuniko verŝajne havis bazon. Tial doni iujn klarigojn mi rifuzis. Al mia argumentado tiusenca — s-ro *Privat* klarigis, ke li principe ne sendas iujn personajn refutojn tiuspecajn. Des malpli li povis kaj rajtis deziri, ke refuton, celantan liajn interesojn, sendu mi. Verŝajne la Ĝeneva Lab. Esp.-Grupo opinias alie ol mi kaj prenis la taskon de mi rifuzitan. Ĉiuokaze estas speciale interese, ke por refuti la okazintaĵon en Sud-Slavio oni serĉas atestantojn en Ĝenevo kaj serĉas ilin unu jaron post la okazinta fakto.

S-ro *Privat* parolante kun mi trovis necesa substreki, ke li estas membro de Svisa Socialdemokrata Partio. Tion mi sciis jam pli frue kaj la K-doj partoprenintaj Leningradan Kongreson eble memoros, ke parolante pri s-ro *Privat* mi citis plene lian titolon kaj nomon "Gvidanto de neŭtrala kaj burĝa esper.-movado Svisa Socialdemokrato s-ro d-ro *Edmond Privat.*

La delikateco de la SAT-redaktoroj instigis ilin el la oficiala raporto pri la kongreso forigi tiujn partiajn aludojn, cetere tute verajn. Do same SAT, kiel mi, agis rilate al s-ro *Privat* lojale kaj la protesto de Ĝeneva Lab. Esp.-Grupo venis ne de ĝusta loko, ne ĝustatempe kaj estas adresita ne al ĝustaj personoj. Ni, la SAT-anoj verŝajne havas neniun specialan intereson por kompromiti s-ron *E. Privat,* por senvualigi lian socian kaj politikan fizionomion kaj konduton antaŭ la esperanta neŭtralularo. Ni tute objektive pensas, ke la movado neŭtralista, kiun certagrade ni eĉ povas utiligi niacele, tiu movado ne dependas de iuj personoj kaj estas neevitebla rezulto de certaj soci-ekonomiaj kaŭzoj. Same mi opinias, ke nur persono konforma al certa movado kaj samvalora, kiel tiu movado mem, povas esti ĝia gvidanto. La movado meritas sian estron. Sed ni devas zorgi pri senvualigo de tiuj agoj kaj paroloj, kiujn efektivigas la person-ecigita neŭtrala movado, kaj kiuj povas iel doni al SAT-anoj kaj al laboristoj-esperantistoj veran imagon pri la esenco de la movado kaj gvidado neŭtralista.

Kun salutoj

via E. Drezen.

Moskvo, 31. 10. 27.

[1]) Cetere la protestintoj aŭ malatente aŭ tute ne legis mian paroladon. Tial eĉ "altanimecon" ili ŝanĝis en "grandanimecon".

*

NIA POŜTO

3489. — Via unua "provo" estas tre laŭdinda. Daŭrigu. Ni uzos parton.

1795. — Tro longa artikolo, loko mankas.

Al kelkiuj. — La "lingvaj demandoj" estas jam delonge transdonitaj al *Fakulo.* Li sendube estas tro okupita k. ne sukcesis ĝis nun trovi tempon por respondi. Paciencu.

Al aliuj. — Ni respondas ĉi tie nur se la sendintoj de materialo petas tion.

Ĉe la neŭtraluloj.

Mi estu neŭtrale malneŭtrala

Por ke mi povu malneŭtrale paroli en nia neŭtrala gazeto, la Redakcio simple deklaru, ke ĝi ne respondecas pri miaj diroj. Tiel argumentas iu *Liang-ĉu-vaj* en la lasta n-o de "Esperanto". Tiu artifiko ja estas simpla! Sed ĉu do la simpleco ne estas ia karakterizo pri genio? Do, de nun, la neŭtrala gazeto povos sendanĝere liveri al sia legantaro malneŭtralan legaĵon.

Kiu scias, ke s-ro *Liang-ĉu-vaj* estas tre lerta ekvilibristo, scipovanta paroli burĝe kun burĝoj kaj laboriste kun laboristoj, tiu ne povas dubi pri la sukceso de l' entrepreno. La lerteco de la neŭtrala malneŭtralulo certe fariĝos proverba. Ĉu do li jam ne sukcesis esti jura konsilanto ĉe la delegito (Ligo de Nacioj) persa princo Mirza Arfa Ed. Dowleh? Estas ĝuste ĉe tiu posteno, ke li povis akiri sufiĉe da orienteco por alpreni la nomon *Liang-ĉu-vaj.* Sed la princo foriris el Ĝenevo. Ŝanĝiĝis la politika situacio en Persio kaj la "konsilanto" restis senokupa. Kaj jen kial li volas nun en sia neŭtrala gazeto diri private malneŭtralajn parolojn pri la Ligo de Nacioj.

Ni certe baldaŭ vidos lertajn akrobataĵojn, kaj pro tio "Esperanto" sendube varbos novajn abonantojn. Almenaŭ tio estas la sincera deziro de *Eutrapel.*

Fermu viajn leterojn per niaj sigelmarkoj.
Prezo: 100 pecoj 1.— mk. g.

Administracio de SAT.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

FONTO DE SUDROJ. DANCO DE SKELETOJ. NOKTO ĈE LANDOLIMOJ, de Ujaku Akita. Kun permeso de la aŭtoro el japana lingvo tradukis Haĵime Ŝuzui k. Kaname Susuki. Eldonejo: Japana Esperanto-Instituto, Uŝigome Ŝin'Ogaŭamaĉi III-14, Tokio, 1927. Formato: 15×11 cm., 73 pĝ. Prezo: 1.25 sv. fr.

Nelaciĝeblaj estas la japanaj esp-istoj. Tie esp.-gazetoj kaj libretoj, ofte modelaj, aperas kiel fungoj. En la supra belaspekta libreto ili prezentas al ni en esp.-traduko tri dramojn, verkitaj en japana lingvo de esperanto-amiko, unu el la plej progresemaj unuarangaj dramverkistoj, kiujn havas nuntempa Japanio. Plezure kaj facile legeblaj estas ili, kvankam kelkloke estas erare uzataj esprimoj, kiel: "vole fermu", "ellacigita", "permesi min tranokti" k. s.

NUR VOLU! La festo de laboro kaj paco. Unuamaja kanto de ribelo. Eldono dua, reviziita kaj ilustrita. 1927. Eldona Kooperativo de SAT, Adm. en Leipzig O 27, Colmstr. 1. Formato: 17×12 cm., 48 pĝ. Prezo: 0.70 g. mk.

La fakto, ke tiu ĉi verketo estas reeldonita, jam sufiĉe parolas pri ĝia posedindeco. *Nur volu* tuj venigi ĝin.

La unua provo de sennacieca arto

estas la serio de poŝtkartoj ĵus eldonitaj. — Unu serio konsistas el kvin kartoj kaj kostas 0,50 mk. germ. Mendu tuj ĉe la **Administrejo de SAT, Richard Lerchner, Colmst. 1, Leipzig O 27**

La plej bona propagandilo por SAT

K·O·R·E·S·P·O·N·D·A·D·O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Britio.

Adresŝanĝo: K-do *W. C. Coghlan,* 36 Exeter Road, *London, E 16.* (Antaŭe en Melbourne.) *Koresp. nepetata.*

Ĉeĥoslovakio.

K-do *V. Kadlec,* Prokopská 10, *Praha III,* dez. koresp. kĉl. pri div. temoj, L., PI., PM., kaj gaz. Resp. garantiata.

— Kolektantoj de poŝtmarkoj atentu! Kiu volas interŝ. PM., skribi al K-do *Artur Zenkner,* n-o 167, *Antoniwald ap. Gablonz a. N.* Resp. garantiata.

K-do *Reinhold Havelka,* n-o 69, *Unter-Maxdorf ap. Gablonz a. N.,* dez. koresp. kĉl. pri div. temoj, L., PI. Certe resp.

K-do *H. Hoŝtalek* (arbar-inĝeniero), Komenská 62, *Č. Budějovice,* dez. koresp. pri laboreblecoj en sia fako en Sovetio.

Germanio.

K-dino *E. Schröder,* Henschelstr. 17, *Kassel,* dez. koresp. kĉl. L., PI., bfl.

K-do *R. Pförtner,* Petzoldstr. 11, *Sebnitz i. Sa.,* dez. koresp. kĉl. pri vegetarismo k. similaj temoj.

K-do *Fritz Schöne,* Lutherplatz 5, *Meißen,* interŝ. poŝtmarkojn.

K-do *Oskar Waller,* Kleinschönau 21, *Zittau i. Sa.,* dez. koresp. kĉl. L., PK., PM. Resp. garantiata.

K-do *R. Eckert,* Hofenerstr. 82, *Stuttgart-Cannstatt,* dez. koresp. pri ĉ. lab. temoj. L., PK. Certe resp.

— Kiu havigas laboradon por komercisto senlabora? Egale kiu metio kaj kiu loko. Mi estas senlabora depost 3 jaroj. Skribu baldaŭ al: K-do *Kurt Kuchinke* (SAT-ano 9499), *Großröhrsdorf i. Sa.*

— Bielefeld-a ŝakklubo laborista dez. ŝakludi kun K-doj kaj kluboj kĉl. Certe resp. Adr.: *Walter Graul,* ĉe Kröger, Goebenstr. 40, *Bielefeld.*

Polio.

— Grupo de junaj geliberpensuloj dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. Adr. *Dla esperantistów,* Stow. Wolnomysl, Polsk., Gdanska 87, *Lodz.*

Sovetio.

— Fervojist-kluba Esperanto-rondeto, dez. koresp. k. diversl. K-doj pri div. temoj, interŝ. PK., gaz. jurnalojn. Adr.: *Kruĵok Esperanto* pri ĵ.-d.-klubo, *St. Dĵankoj,* Krimeo.

— Tutmonda gejunularo! Mi dez. seriozan k. daŭran koresp.-adon pri div. temoj prec. k. komsomolanoj. Adr.: *S. Aptekman,* Srednij pr. 39, kv. 6, *Rostov-Don.*

— La Junular-Rondeto serĉas koresp.-antojn el ĉl. pri problemoj de Junularmovado ktp. Adr.: *S. Holesničenko,* Sovetskaja 19, *Brjansk.*

K-do *Joh. Isaenko* (studento de Politeknika Inst. ĥemiisto), Detskij gorodok Obschejitie N-b. kom. N 21, *Sverdlovsk,* dez. koresp. kĉl. pri div. temoj.

— *Esp.-grupo de junkom-istoj,* Gosbank SSSR., *Kutais,* dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

— Kiu dez. koresp. kun laboristoj de fervoja metiejo? Skribu al K-do *V. Baranov,* Glavnie Masterskie S. K. ĵ. d. Sĉetovodstvo, *Rostov-Don.*

K-do *B. Ejdemiller* (19-j. junkom-isto, kolorfrotisto), Srednij prosp. 50, kv. 5, *Rostov-Don,* dez. koresp. kĉl., pri div. temoj.

K-do *I. Abramson,* ul. Djumina 22, *Berdjansk,* dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L., PK., PI. prec. pri med. Dem.

K-do *I. E. Makŝakov,* Puŝkinskaja 214, kv. 1, *Rostov-Don,* dez. seriozan k. daŭran koresp.-adon pri lab. vivo k. laboro, kĉl. Skribu multnombre! Resp. garantiata.

Urba SEU-grupo, poŝtkesto 16, *Koĥma,* Iv.-Voznesensk. gub., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-do *Jakov Ŝulc,* selo Aleksandrovka, *P. O. Baĵmetjevo,* Artemo. okr., koresp. kĉl. L., PK., PI. Ĉiam resp.

Svedio.

K-do *Henning Andreasson,* Björkelund, *Drev,* dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L., PK., PI. bfl.

K-do *Walter Gustavson,* Lundsborg, Drev, *Braås,* dez. koresp. kĉl. L., PK., PI.

Dm. Albanov (1188)

post duonjara interrompo invitas ĉiujn siajn korespondantojn renovigi amikan interparolon. Ankaŭ la novuloj estas varme akceptataj en nian amikan rondon: Temo: — vivkondiĉoj de via lando kaj moroj de via popolo (eĉ. ilustr. PK estas akceptataj kaj rekompencataj!) — kun specialistoj: — kooperaci-movado, ĝia teorio, kaj ĝia praktiko en diversaj landoj.

Mia adreso: Mez-Azio, Uzbekistan, **Andiĵan,** Rajĥilopsojuz (Koton-kooperativa regiona Unuiĝo), Org-fako.

Ĵus aperis:

Humor' de l' mondo en Esperanto

de D-ro **Emil Pfeffer**

La ŝerco, sprito kaj anekdoto de diversaj popoloj en Esperanto kun akompanata germana teksto kaj lingvaj klarigoj. **96 paĝoj — Prezo 0.50 mk. germ.**

De la sama aŭtoro:

	mk. germ.
Esperanto en 10 lecionoj (lernolibro por germanoj)	0.25
Unua Esperanta legolibro por komencantoj kaj kursoj	0.25
Vortaro Esperanta-Germana	0.25
Vortaro Germana-Esperanta (30 000 tradukoj)	1.—
Ĉu vi parolas Esperante? (Enkonduko en la esperantan konversacion)	0.25
Esperanta Komerca Korespondo	0.50

Postulu senpagan prospekton kun prov-paĝoj de
Administracio de SAT, R. Lerchner, Leipzig O. 27, Colmstr. 1.
Poŝtĉek-Konto 6835.

ENHAVO:

Alia Sacco, alia Vanzetti, de E. K. L. . . . . pĝ. 57
Por la 10-jara Datreveno de "Oktobra Revolucio", de 518 „ 57—58
Romain Rolland pri Sovetio, (trad. el la franca) . . . . . „ 58
Tago el mia vivo, de M. Balaguer „ 59
Eĥoj el Londono, de 488 . . . „ 59
El Portugalio . . . . „ 59
Mia Buĝeto, de 1311 . . . . . „ 60
El Aŭstrio . . . . „ 60
Pri Raciigado, Trad. I. H. K. . . „ 60
Miniaturbildo el Hungario . . . „ 61
Konsilejoj pri edzeco kaj seksa vivo, de 3018 . . . . . . „ 61
Kion mi vidis en Turkio, de E. E. Y. . . . . „ 61
Tra Esperantio . . . . „ 62
Diversaĵoj . . . . „ 63
Recenzejo . . . . „ 64
Korespondado, anoncoj . . . . „ 64

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)